



# PENSEO

*N-ro 389*

*mar. / 2024*

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 35-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Maria Nazaré Laroça (Brazilo)




### Ekflori

Mi serĉadas  
senvortan poemon  
por prikanti silente  
la necesan doloregon.

Preĝo estus pli bona  
por kunvivado amika,  
kiam l'animo brilegas  
en fonto de lum' kaj vivo.

*Juiz de Fora, 30/01/2024.*

## Rita Mkrtĉjan (Armenio)



### Animo kaj Muziko

Kiel vundita bird', Animo,  
Ekflugi provis super ter'  
Kaj pensis, - Kio egaliĝas?  
Kun vi Muzik', la ĉarmo kaj mister'.

Animo vivis nevideble,  
Sinceris nur kun frata kor',  
Sopiris ĝi, triumfis iam,  
Pro la forgeso kaj memor'.

Nur kun Muzik', ĝi amikiĝis,  
Ekĝois ĉiam pri alven',  
Feliĉe ŝvebis en ĉielo,  
Liberigita de katen'.

Malĝoj' kaj larmoj malaperis,


Kiel la lasta nokta stel',  
Kiam Muzik' fenestron frapis,  
Alvokis ien en fabel'.

O, kiel amis la Anim' Muzikon,  
Kaj reviviĝas dank' al ĝi esper',  
Rezistis, la Anim' reveni  
En mondon, kie regis la sufer'.

Sonadis la Muzik', belec' revenis,  
Por kiuj ne ekzistis lim',  
Kaj kun Muzik' rondiris sinforĝese,  
Ravita kaj fidela la Anim'.

\*\*\*

Mi ĉiuvintre "mendas" la pentraĵon  
Glacio, branĉ', frostitaj larmoj,  
Kaj la beleco tiu nur portempa  
Kiel kurteno diafana kaj malvarma.  
Pentraĵ' degelos post monato,  
Sen plend', kviete kaj senmove,  
Se ni ĝisvivos la venontan vintron  
Pentraĵon mendos mi denove.



Kion fari, belega glacio  
nin devigas rakonti pri  
vintro,  
Novaj strofoj de la poezio  
Kiel spiro frostita sur  
vitro.

\*\*\*

Pentristo Vintro nokte kolorigis  
Per blanka farbo arbojn kaj la stratojn,  
Kaj atenteme sekvis la flugadon  
de etaj "muŝoj" tra fenestro nigra kato.  
Haltejo laŭvica - Februaro,  
Ĉu eblas per neĝer' leteron sendi?

Pri la espero, pri feliĉ' kaj bonaj tagoj,  
Ne scias, sed ne ĉesos ni atendi...

## Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)



Ferio ĉe frititaj kaŝtanoj –  
Ne gravas, ke frostetas la manoj,  
Ne gravas, ke nebulo vualas  
La Eifel-turon eĉ en proksim',  
Ne gravas la neĝet' januara,  
La vivo estas hela kaj klara,  
Se la neĝeroj parizaj falas  
Al la anim'.

Bonjour, Paris, bonjour !

En la impeta esto  
min logis la fantom'  
de la iama kun',  
sed rajdis tagoj sur  
kaleŝo de molesto  
kaj en rutina frid'  
degelis lanta spur'.

De l' firmament' nebula profundo.  
Brilas larmet' pro senta inundo,  
kaj fraŭlineto, kvazaŭ konata,  
al mi ridetas ĉe preterir'.  
Ravas min en la vertiĝo pensa  
ĉiu vizaĝo – kvazaŭ parenca –  
jen la feliĉ' de l' sorto donata  
post la sopir'.

Bonjour, Paris, bonjour!

En la proksim' sincera  
mi, eble, tedas vin  
per mia sent' – lavang',  
sed mi deziras nur,  
ke dum la viv' surtera  
per via taga bru'  
plenplenu mia sang'.

En kafejet', ĉe l' varmo kamena  
sidu mi post la ĝuo promena,


kaj per la lipoj, kvazaŭ kisante,  
tuŝu la ĉarmon de l' ruĝa vin'.  
Mi kun plezur' bageton gustumu,  
ĉe l' vesperiĝ' la tagon resumu  
kaj diru, ke l' fortune frivola  
plu ŝatas min.

Bonjour, Paris, bonjour!

Fluegas tempo mia –  
ne plensatigis min  
l' admira rendevu' ...  
Sed kun la varma spur'  
festena kaj feria  
en la feliĉa sin'  
mi povas vivi plu.

\*\*\*

La sankt-peterburgaj benjetoj  
sendube ja estas benetoj  
por gusto eĉ plej postulema  
ĉe sido dum tag' senproblema  
en la benjetej' grandbutika,  
en rondo malvasta amika.  
Sed poste minacas provoko –  
daŭrigi la ĝuon kun vodko  
kaj esti en gaja ebrio  
sen pensi pri sekvoj de tio.



\*\*\*

Mi metu merizeton rememoran  
pri la somer' pasinta ne tre for en  
la memorkarto de animo mia,  
ĉar ĉi somero estis fantazia,  
ĉar ja efektiviĝis ĉiuj planoj,  
ĉar pli rapide frapis mia man' ol  
en la somero morna antaŭjara  
laŭ la fidela nigroblank' klavara.  
En mia vica varma vivaŭtun' do  
post lundo haste venas nova lundo,  
kaj sunsubiro sunleviĝon spronas,

kaj tag' malbonas, aŭ kontraŭe – bonas,  
se mi bonŝancas inter miaj zorgoj  
ideon kapti, finrimotan morgaŭ,  
kaj dolĉas tiam fluga viv' poeta  
samkiel rememoro merizeta.

\*\*\*

Mi konstatas kun angoro kaj ĉagreno,  
ke ne ĉiuj anoj de la homa gento  
havas tion, kion donas dia beno:  
iom da mizerikordo kaj prudento.

Ĉar ja bone scias mi, kiu konstruas,  
kiu malfekundan virgan teron kulturigas,  
sed ja bone scias mi, kiu detruas,  
kiu murdi nur instruas kaj intrigas.

Ĉar mi aŭdas kiel vee sonas kri' de  
mortigataj homoj pacaj kaj senkulpaj,  
sed la mondo nur ŝultrumas hipokrite...

\*\*\*

Jen estas sankta urbo de Jesuo  
en sankta lando, lando de Jesuo,  
kaj en la urbo de la Dipatrino  
por ĉiu gent' ĉeestas Dipatrino.

Sed savi homojn de raketa bruo  
en propra land' ne hastas nun Jesuo,  
kaj Dipatrino al infana kri' ne  
reagas kun kompatato dipatrine.

Pereas centoj, ne, pereas miloj,  
kaj elvivintoj preĝas en humil' al  
la Forto ĉiopova kun espero,  
ke fine havos pacon l' Sankta tero.

Sed vanas preĝoj, daŭras la detruo –  
superas preĝojn la milita bruo,  
demandu mi do nun kun koroskuo:  
- Ĉu vi surdiĝis, dia fil', Jesuo?



## Ángel Arquillos (Hispanio)



Pro tio mi kaŝ-ludas kaj gapas kun ĉagreno

Fluadas la sentoj  
kvazaŭ enormaj riveroj  
kovrante dezertojn.  
Ekkrias la poeto  
kaj la banalaj pensoj  
vigligas la serenon  
kaj renaskiĝas febro.  
Denove la serpento  
englutas en silento  
malgrandan kampo-muson.  
Mi ŝatas la serenon,  
pro tio mi kaŝ-ludas  
kaj gapas kun ĉagreno  
tra la natur-fenestro.  
Kriegas frenezuloj  
tre laŭte  
kaj bruoj de la strato  
traboras la orelojn.

## Wally du Temple (Kanado)



Ĉevalo, Nova Avataro Indiĝena

Prapatroj diras ke  
Indiĝeno  
antaŭ ĉevalo,  
peze-ŝarĝita,  
malrapida,  
terligata-  
sed kiam ĉevalo invitis homojn  
rajdi sur dorso  
tiam  
*liber-fluga, liber-briza, liber-ira kiel vento,*  
ĉevalo- flugtera kaj netera potenco  
ĉevalo ebligis al sonĝmigrantaj ŝamanoj  
flug-atingi potencojn  
el kardinalaj direktoj  
el oriento, spirit-aglo

el okcidento, spirit-urso  
 el nordo, spirit-bubalo  
 el sudo, spirit-muso  
 ĉevalo kaj fajro  
 egalaj malkovroj de triboj  
 ĉevaloj sentas niajn animojn kaj estas lojalaj  
 kunuloj  
 ili instruas, ke saĝo venas de sentado kiel la  
 aliulo sentas  
 tiele trovi kompaton kaj enirejojn al potenco  
 ĉevala scio ebligas ekvilibrantan potencon kaj  
 perspektivon  
 Ni lernu sekvi la ekzemplon de ĉevalo

## Polinezia Sunsubiro

Mi,  
 malfrue al ŝipdeko,  
 por spekti spektanklan  
 sunsubiron.  
 Videblaj!  
 bruligitaj  
 dorsoj, sienaj,  
 grasaj korpoj  
 ŝmiritaj kontraŭ  
 suno  
 en la tiea nuno  
 kiuj per fotiloj anticipas  
 eventualajn mirindaĵojn  
 bite kapitajn por reta elsendo.  
 Kiel mola rubeno brilas  
 kiam suno subeniras  
 en lazuran maron  
 malantaŭ Nuku Hiva  
 En la Markizinsuloj  
 De Franca Polinezio

## Yi Qiao (ĉino en Germanio)



## Rememoro ĉe l' plaĝo

Mi promenas ĉe fruĵara plaĝo  
 kun apude milda briz' susura:  
 flirte preter mia sobr-vizaĝo,

kiel flustro sorĉe am-murmura.

Tuj vekigās dolĉa rememoro  
 pri pasinta jam junec' fiera:  
 kiel vivdebuta hel-aŭroro,  
 kun eterne vigla verv' prospera.

Nostalgie morna mi suspiras  
 plene de elkora pez-lamento.  
 Al splendo glora mi sopiras  
 jam kun varmaj larmoj en silento.

Se nur en la koro estas amo,  
 ardas ĉiam la juneca flamo.

## La nova Edeno

Jen aŭroro frumatena  
 kiel via bel' miena  
 el memoro de juneco  
 kun vigla deco.

Jen helbril' tagmeza  
 kiel via kis' karesa  
 el memoro de bel-amo  
 kun arda flamo.

Jen lunlum' vespera  
 kiel la brakum' tenera  
 el memoro de pasio  
 kun morna nostalgio.

Jen stelaro noktĉiela  
 plen-de admonad' fidela  
 el memoro de pasinta vivo  
 kun vasta perspektivo.

Per firmkred' en Dio ĉiopova  
 ni beniĝu en l' Edeno nova!

## Wélington Rocha (Brazilo)



## La birdo

Plaĉas al mi tiu birdo forte

Ĝia sono aŭguras bonsorte  
Kia plezur'  
Nun anstataŭ tristo , fakte ĝoj'  
Iras kun mi laŭlonge de l' voj'  
Dankas mi nur

## Yohanes Manhitu (Indonezio)



*Poezion oni devas verki*

*"Poezio komenciĝas per revo  
kaj finiĝas per liberigo."  
(Mohammad-Ali Sepanlou)*

Poezion oni devas verki  
kiam la koro estas pura  
kaj la brusto estas varma.

Poezion oni devas legi,  
neniam devas ĝin kaŝi.  
Ĝi devas ĉiam vivi.

Poezio estas akvo disverŝanta  
de la koro kaj de la animo  
serĉanta vojon por eliri.

Poezio estas bona frukto  
de la arbo plej fruktodona  
surverŝata kun akvo benata.

Poezion oni devas tuj verki  
por porti la veran lumon  
kiam la mallumo alvenas.

## Jadranka Miric (Serbio)



*Februara mildas*

Ĉambro plenas de sun' .  
Sur muro ombro dancanta,  
ekstere apenaŭ vento blovanta,  
je blua ĉiel' videblas lun' .

Frosta branĉaro varmiĝas

de matena forta sun' .  
Eĉ paseroj gaje ĉirpas  
ĝuante en varmo ĝis apero de lun' .

Surtere verdiĝas galanto-foliar'  
kun blanka kapo kliniĝas  
al la ter' kie semojn birdar'  
malsata urĝe serĉas.

## Amonaskiĝo

Noktiĝas lunlume.  
Tago plilongiĝis.  
Pritempas sune.  
Tero varmiĝis.

En tia tago  
trafis ŝin amosago.  
Ŝi kaj li promenas,  
ĉe riverbordo venas.

Mano en mano,  
plektiĝas fingroj ,  
kvazaŭ ili estus en malsano,  
ŝvitas manplato, tremas lipoj.

Okuloj serĉas ion surtere.  
Ho, honte flustras li "Kara ci,  
pardonu min, mi devas kisi vin."  
"Ne, petu pardonon, nur kisu min."

## Erika Godó (Hungario)



*La printempo*

Printempo estas mirinda sezono,  
jen, kiam la naturo vekigiĝas el sia vintra  
dormo.

La hela sunbrilo varmigas mian koron,  
floroj malfermas siajn petalojn.  
Sur la herbejoj blovas printempa venteto,  
la memoro pri vintro ankaŭ forvelkas.

Verdaj folioj, florantaj bonodoraj floroj,  
kantantaj birdoj salutas la bonan veteron.

Printempo finfine moviĝis en mia koro,  
buntaj floroj floras en ĝi kiel magio.  
Printempe ĉio en la naturo reviviĝas,  
printempo jam estas la promeso de somero.

## Jaro de la drako

Jaro de la drako, fajro kaj flamoj,  
ĝi alportas bonkorecon kaj kuraĝon al niaj  
koroj.  
Estaĵo ŝvebanta en la nuboj altaj,  
liaj flugiloj brulas per ardanta fajro en la  
ĉielo.

La ruĝa drako flugas super la nuboj,  
poste ĝi plonĝas en la profundo de la  
oceano.  
Giaj okuloj brilas kiel forta radio de ardanta  
suno,  
ĝia fuma spiro estas kiel la mordanta vintra  
vento.

Nia kuraĝo estu kaj fortu kiel koro de drako,  
nia forto estu tiel granda kiel ĝiaj flugiloj.  
La jaro de la drako alportas al ni pacon kaj  
feliĉon,  
kaj alportu bonŝancon kaj kuraĝon al homoj.  
Per ĉi tiu poemo mi deziras al ĉiuj Feliĉan  
jaron de la drako!

## Ardo (Ĉinio)



## Frua printempo

dum lastaj tagoj post la nova jaro  
ja estas tre agrabla la vetero.  
printempo startas jam en januaro,  
sed ne burĝonis plantoj sur la tero.

la urbo bruas kaj je homoj plenas,  
sed nur mi estas la fremdulo sola.  
sur vojo de vilaĝo mi promenas,  
en milda vent' mi estas bonhumora.

## Omaĝe al la jubileo de dekjara datreveno de Zaozhuanga Esperanto-muzeo

Jen estas solena dekjara jubileo  
de nia Zaozhuanga Esperanto-Muzeo,  
el ĉi tiuj kolektaĵoj pri Esperanto--  
estas jen raraĵoj kun bril' de diamanto,  
ĝi estas esplorbazo por esperantistoj,  
kaj la eduka centro por geinstruistoj.  
Ĝin oni aplaŭdas kiel ekspozicio  
de esperanta kulturo kaj historio.  
Nun karaj geamikoj donas bon-ideojn,  
por havi belan perspektivon de l' muzeo.  
Gratul-leteroj venas el la tuta mondo,  
kun bondeziroj por la belega estonto.  
Kiel hela stelo brilas en oriento,  
ni povos fari novan gloran monumenton,  
en kiu ĉikunas la altan idealon  
de ĉiuj geesperantistoj kun lojalo.  
Antaŭ ni jen estas persisto, eĉ la lukto,  
sed post laboradoj ni gajnos pli da frukto.  
Ĉar la muzeo donas al ni energion  
por realigi nian sanktan ambicion.

## Elena Popova (Bulgario)



## Parolado kun la soleco

- Kiu flustras ĉirkaŭ mi?
- Mi estas, la Soleco.
- La Soleco? Sekve vi ne estas muta? Kiu  
vin sendis?
- Ĉu vi ne memoras? Vi invitis min.
- Mi ne estis malŝlosinta la pordon.
- Ne, sed mi havas ŝlosilon pri ŝlositaj  
pordoj.
- Iru, mi volas neniun ĉirkaŭ mi!
- Pro tio mi estas tie ĉi, pro bedaŭro.
- Kion vi volas?
- Ke ni interparoladu!
- Mi ŝatas la silenton. La Fato decidis, ke mi  
estu sola.
- Kara, nenion decidis la Fato, la vivo estas  
via propra elekto!

- Ne! ...Eble...

## NOVIARA FESTO EN LA ARBARO

La arbaro, neĝe kovrita blankas, kiel  
novedzino antaŭ la altaro. Kiu frue leviĝas,  
tiu faras vojon. Alia cerbumas, lulas milde  
siajn branĉetojn kaj surŝutas per steletoj la  
scivolemajn bekojn kaj nazetojn.

- En la arbaro estos io, venos io!... –  
ekflustris pasereto.

- Hej, etulo, vi ne miru, vi ekflugu! – kriis la  
korniko de iu branĉo seka. La tuta paseraro  
kvivitis kaj ekflugis, ĉiuj similaj unu la  
alian.

Flugas la plumohavaj kaj kantas: “Nia anaro  
pace sur siaj flugiloj portos la Novan  
jaron...”

Sur la neĝo leporoj – fratoj, kuzoj kaj  
najbaroj – marŝas. Post ili – la sciuretoj, la  
vulpetoj kaj la lupetoj. Eĉ ursetoj ne dormas  
kaj viciĝas en la kolono. Ĉiuj ĉirkaŭrigardas  
sin – kion ili serĉas?

- Haltu ĉe mi! – mallaŭte diris abio. – Mi  
petas vin, ne haku min, nur min ornamu! Mi  
estas juna, lasu min viva renkonti kun vi la  
feston!

Ekkantis tiam la birdoj: - Pravaj estas la abio,  
pinoj kaj aliaj, ili volas vivi. Ni gardos kaj  
ornamos tiun abion...

Fine ili ekdancis kaj Ĵuris: “Ni amikiĝu kaj  
interfratiĝu!”

Nerimarkeble venis la Bono en la animojn  
de la arbaraj loĝantoj: - Vivu pace sur la  
tero!...Feliĉan Novan Jaron!

### Ivanichka Magharova (Bulgario)



Sunsubira lun’  
sur altaĵon verŝiĝas.  
Ekdormiĝas urb’.

Senhejma luno  
aperis super l’ arbar’.  
Birdoj raviĝas.

Etaj neĝeroj,

milda vintra anoncist’,  
kisas la teron.

En la fenestro  
steloj. Klarneto ĝemas.  
Bela neĝa nokt’.

Blanksonoriloj  
sub la neĝo montriĝas.  
Printempodoro.

\*\*\*

Senstela ĉiel’.  
Nur la luno sekrete  
flirtas Venuson.

Neĝa blovado.  
En la arbara pado  
du paŝoj sur neĝ’.

Neĝ’ . Bluso. Kamen’.  
Virino sur la vojo.  
Silent’ eksonas

.  
Maneĝ’ . Ĉevalkur’.  
Ŝi balancas. Pli blanka  
ol pala nuanc’.

Vespera malĝojo’.  
Memoro el pasintec’  
varmigas koron.

\*\*\*

Aŭtuna ĉiel’.  
En la sino de panjo  
katid’ katzumas.

Vesperkrepusko  
ĉiela brilado. Mi  
sonĝas la stelojn.

En dezerta hejm’  
sur sojl’ katido sola.  
Mankas fajrujo.

Noktomeza blus’

surkovras mian liton.  
Tasoj malpenaj.

Odor' de rozo en  
Paradizĝardeno.  
Eva flirtadas.

### Miĥajlo Draj-Ĥmara (1889-1939)



## Cignoj

*Dediĉite al miaj kamaradoj*

Sur lag' de revoj salikaraj kaj silento,  
jam malsovaĝigitaj iam de l' soci',  
naĝadis ili en la varmo kun graci',  
kurbiĝis koloj, kiel vergoj en la vento.

Kaj kiam falis al la lag' de frost' arĝento,  
kovriĝis akv', endormiĝante, per glaci, —  
tuj rompis la naĝantoj ĝin kun la pasi',  
minacojn vintrajn lasis ili sen atento.

Grapol' kvinopa\*, kantas venke via band'!  
Tra ŝtorm' kaj neĝo tondras la triumfa  
kant',  
rompanta nun de l' trista malesper'  
glacion.

Kuraĝu, cignoj: de sklaveco kaj neest'

al mondoj vokas vin de Lir' konstelacio  
kun ocean' de l' viv', ŝaŭmanta en  
tempest'.

1928

*Miĥajlo Draj-Ĥmara, Ukraina poeto, tradukisto,  
literatureksploristo, lingvosciencisto.*

\*"Grapol' kvinopa" estas grupo de kvin konataj  
ukrainaj novklasikaj poetoj: M. Rilskij, M. Zerov, P.  
Filipoviĉ, O. Burhard (Jurij Klen) kaj la aŭtoro  
mem.

*Elukrainigis*



**Petro Palivoda (Ukrainio)**

### Fernando Pessoa (1888-1935)



## Sentabundo

Mi sentabundas intense  
do ja konvinkiĝi povas  
pri mia nepra sentem'.  
Samtempe tamen mi trovas  
ke ĉi-ĉio kuŝas mense,  
estiĝante jam dilem'.

Ĉiuj ni vivas sub gvido  
ja de l' viv' de ni vivata  
kaj de dua en la pens'.  
Sed tiu en sindivido  
inter la du la spertata  
vere estas, spit' al dens'.

Fakte ĉu estus por ni  
viv' ol ĉi nuna pli ĝusta,  
responzon kiu decdonos?  
Striktu nia penso pri  
nia viv', se pli bongusta  
iam estos ni ĝin konos.

## Aŭtopsikografio

Siaarte la poet'  
doloron kredigas forte  
kvazaŭ sian pro la net'  
de ĝi tie do subvorte.

Tamen ĉe kiuj lin legas  
ne plu l' senton pri dolor'  
liaj du doloroj regas  
sed tutnova en ĉi hor'.

En rondir' laŭ l' rejla ordo  
kun laŭditstr' al la raci'  
jen re-kaj-re trajn' de kordo:  
jes ĉi vera kor' de ni

*Elportuglis*

### Wélington Rocha (Brazilo)



## Visar Zhiti



### Ĝaj kozoĵ

Nur per unu folio  
Mi scipovas paroli pri la arbaro

Kaj nur unu stelo  
Povas konfirmi ke vi ne solas

Unu perdita ŝuo  
Vekas vin senfinajn vojojn

Ekbruligu cigaredon  
El la pakaĵo de Prometeo

### La arbara elegio

Estas jam ŝrumpita la arbara surfaco

Kaj estas pliiĝita la surfaco de timo,  
Estas ŝrumpita la arbara surfaco,  
Malpli da bestoj estas nun.

Malpli da kuraĝo, malpli da fulmoj

Malpli da beleco.  
Kaj la luno estas nekovrita

Kvazaŭ doloriga senvirgeco  
Kaj poste forlasita.

Estas ŝrumpita la arbara surfaco

La surfaco de poezio, de sopiroj  
Foliaj paroloj estas ja malpli  
Kaj onidiroj pli.

Estas ŝrumpita la arbara surfaco,

La riveroj ne plu raviĝas,  
La riveroj konfuziĝas,  
Kvazaŭ zebroĵ en la zooparkoj, vidas nin  
al rivero.

Estas ŝrumpita la arbara surfaco,  
Kaj la surfaco de la honto,  
Kiom malmulte da honto ni havas nun,  
Mi pentas pro nenio,  
Tro malmulte da tempo estas ĉe ni por  
penti.

## Reklamoĵ kaj dilemoĵ

Magazenoĵ, kinejoĵ kaj gloroĵ,

Pliiĝis la surfaco de la urboĵ,  
Ankaŭ la surfaco de la honto pliiĝis  
Tutaj tiuj hontoĵ nkiujn apenaŭ la gazetoĵ  
kovreblas

Sed daŭrigas la sekvontajn numerojn  
Kaj en la sekvonta abono de la frenezeco

Ŝrumpiĝis la surfaco de la arbaroĵ  
Kaj pliiĝis la direktorejoĵ pri la arbaroĵ

La surfaco de la amo ŝrumpiĝis  
Kaj la birdoĵ havas mapli da loko  
Por iliaj amoroĵ  
Ili ja ne scipovas amori en la oficejoĵ

Ŝrumpiĝis la surfaco de la vizaĝoĵ  
Knabo pentras arbojn sur la muroĵ  
Li pentras arbojn antaŭ miaj okuloĵ  
Li faras la tatuon de la arbo  
Sur la haŭto de ties maldika brako

Kiel la fino de dudeka jarcento  
Tiel profunden li alfiksas la varmegan piglon  
kun farbo  
Tiel ke la arbaro zumas ensange kvazaŭ  
doloro  
De vunda inflamiĝo.

*Elalbanigis*



**Bardhyl Selimi**  
(Albanio)

## El ĉina antikva poezio

**Li Yu (937-978)**

—*laŭ melodio Ondo lavas sablon*

Ekster fenestro pluv' tik-takas bate,  
printempo jam alvenas al la fino.  
Satena litkovrilo povas ne rezisti  
kontraŭ aŭrora frosta la domino.  
En sonĝo, se forgesi pri vagabondeco,  
mi povas ĝui la plezuron en la sino.

Ne staru sola ĉe la balustrado  
por vidi montojn kaj riverojn kun  
senlimo.

Facilas ilin adiaŭi, malfacilas  
refoje vidi ilin eĉ en halucino.  
Forfluas akvo kun falintaj floroj en  
printempo,  
hommond' jam ne plu belas en fascino.

—*laŭ melodio Budhista dancisto*

En kort' pitoreska la feeca belulino,  
siestas en pentrita ĉambro en silento.  
Ĉe l' kapkusen' hararo ŝia en brilglimo  
videblas okulplaĉa jen en ĉi momento.  
Jen rob' brodita ŝia bonodoras sen difino.

Eniras mi kaj l' ringojn tuŝas sur la pordo  
kun inkrustitaj perloj, vekas ŝin el  
song-sfero.  
Kun dolĉa la mieno ŝi rigardas min sen  
vorto,  
kaj mi rigardas ŝin ankaŭ kun sincero.  
Inter ni fluas intimeco en akordo.

—*laŭ melodio Feo ĉe rivero*

Ne videblas bela flutistino en la turo,  
la pejzaĝ' de reĝa la ĝardeno vanas bele.  
Floroj kun pistilo ora kaj palruĝa petalaro  
sin inklinas aŭ l' kapon levas jen fiere.  
Sed la orienta vent' min ne favoras,  
ĝi nur disflorigis jen duonon blovepele.

Ĉe fenestro mi sopiras longe en enuo  
ĝis la sunsubiro kaj eksonĝas senkonscie.  
Kiel mi bedaŭras pri l' pasintaj tagoj!  
Ekster balustrad' sub plorsaliko ni pasie  
rendevuis, kvankam mallongtempe,  
kvazaŭ songe, vere tragedie.

—*laŭ melodio Belulino Yu*

En printempa vent' ĝardeno mia  
verdas kaj salikoj ŝosas june.  
Mi apogas min al balustrado sola  
senparola dum longlonga tempo nune.  
La novlun' kaj flutmuziko samas  
kiel tiujare, sed sen ludi kune.

La festeno ne finiĝas kaj flutsonoj  
ja ankoraŭ ŝvebas en aer'.

La glacio sur lageto ekdegelas.  
En profunda nokto la kandel'  
malheliĝas eĉ en pentrita palac-ĉambro.  
Kun grizblankaj haroj, ho ve, sen esper',  
mi ne povas vivi jen en tia pens-sufer'.

*Elĉinigis*



**Veĵdo (Ĉinio)**

**Zhang Ji (ĉ. 715 - 779)**

Nokta ankrado ĉe l' acer-ponto  
Lun' subira, korva grak' en gelĉielo,  
fiŝist-torĉe mi morn-dormas sub acero.  
El la Templo Hanshan ekster l' Urbo Gusu,  
tintoj al boato tra meznokt-aero.

**Li Yu (937-978)**

*Kiom da morn-sento*

—*laŭ melodio Belulino Yu*

Kiam ĉesus l' aŭtunluno kaj printempa  
floro?  
multaj pasintaĵoj amasiĝas en memoro.  
Lastnokte vent' easta blovis ree tra l' kastel',  
mi timas rememori eks-patrimon en lunhel'.

Ĉizbalustradoj kaj marmoraj ŝtupoj restas,  
eksaj radiintaj vangoj nun ne plu majestas.  
Demandate, mi sinhavas kiom da  
morn-sent'?

jen rivero plen-de primaverotajd' al orient'.

*Elĉinigis Yi Qiao (ĉino en Germanio)*



**Bai Juyi (772-846)**

*Nokta neĝo*

surprizis min la litkovriloj fridaj,

fenestroj estas hele lumigitaj.  
noktmeze la falita neĝo pezas,  
kaj krakas la bambuoj derompitaj.

Ma Zhiyuan(ĉ.1250-ĉ.1321)

## Aŭtuna penso

—laŭ melodio Tianjinsha

sekaj lianoj, oldaj arboj, nigraj korvoĵ.  
ponteto, roĵo, dometo.  
dezerta voĵo, frosta vento, magra ĉevalo.  
la suno subiranta.  
korŝira homo en fora loko.

Wang Anshi (1021-1086)

## Novjara tago

petardaj sonoj jam forsendis la pasintan  
jaron,  
drinkante vinon oni ĝojas en printempa  
vento.  
sunlumo varma brilas super mil da  
loĝdomaro,  
Pord-diaĵ bildoj novaj benu nin en la  
konsento.

Ouyang Xiu (1007-1072)

## En Lanterna Festo

—laŭ melodio Sheng Zhazi

En la Lanterna Festo de pasinta jaro,  
lanternoj en foiro brilis tiel hele.  
Mi rendezuis vin do kiel ama paro,  
la luno pendis sur saliko jam vespere.  
En la Lanterna Festo de kuranta jaro,  
la luno kaj lanternoj brilas tiel hele.  
Kie troviĝas homo de pasinta jaro?  
mi viŝas larmojn permanike kaj leĝere.



Elĉinigiŝ Ardo (Ĉinio)

# Ĉineske

Veĵdo (Ĉinio)

## Pino en ventpel'

—laŭ ĉinesko *Vento inter pinoj*<sup>1</sup>

Pino staras en ventpel'  
skue kun leĝer'  
jen dekstren jen maldekstren  
en hurloj  
pro ventkruel'.

Firme kroĉiĝas al ter'  
sen ajna desper'.  
Ĝi tenas sin firme kaj  
sin gratulas kun fier'.  
Ĝi des pli memfidas  
post ventblova sever'.

## Papilio flugas

—laŭ ĉinesko *Kanto de akva horloĝo en nokto*<sup>2</sup>

Gracie,  
leĝere  
ĝi flugas libere.  
Sur planto  
suĉas ĝi  
floron en ebri'.

Ĝi haltas  
sur petal'  
pro ventpelo el val'.  
Poste ĝi  
kun fervor'  
penas en labor'.

## Jasmeno ekfloras

—laŭ ĉinesko *Aroma laŭrbranĉo*<sup>3</sup>

Jen la jasmen'  
ekfloras bele  
en mia ĝarden'.

Jam aromo ŝvebas  
 ekde maten'.  
 Mi prizorgas ĝin vere  
 kutime  
 kun granda pen'.  
 Rekompenas  
 ĝi min fine  
 per aromplen'.

Dum mi promenas sen ĝen'  
 jen sur aleo,  
 en ĉirkaŭpren'  
 de la flora arom'  
 mi en kort' jen.  
 En la sunluma tago  
 mi flaras  
 kun kor-seren'  
 bonodoron  
 nazopikan  
 ja sen ĉagren'.



## Zhuang Qixiong (Ĉinio)



### Printempo

—laŭ ĉinesko *Yumeiren*<sup>4</sup>

1

Radias la ruĝ-vesper'  
 en blua ĉiel'.  
 Flirtetas nebul' ĉe roz'  
 en ĉarma kaj kompatinda poz'.

Hirundoj flugas alte,  
 lace, senhalte.  
 La papilioj ŝvebas  
 kaj al pli bona vivo strebas.

2

Zefiro sentas plene  
 kaj blovas pene,  
 kun senlima ĉagreno  
 kaj neforgesebla kompreno.

Rivere akvo ondas,  
 al vent' respondas,  
 plaŭdas ondoj laŭrole  
 kaj mizeron rakontas sole.

3

Venteto branĉojn lulas,  
 kaj pluv-nebulas.  
 Lirlas la dolĉa fonto  
 kiel nektaro sur am-ponto.

Akvon tuŝetas libel',  
 lotus' en ĉiel';  
 herberoj jam elĝermis,  
 birdetoj flugilojn malfermis.

4

Ektondras en printempo.  
 Jen ora tempo!  
 Ĝi konsternas ĉielon  
 kaj surdige skuas la teron.

Fulmadas en pluv-tago.  
 Nova imago!  
 Ĝi oras tristan vojon  
 kaj vekas feliĉan viv-ĝojon.

5

La ume-arboj hontas,  
 la floroj fontas  
 per sia arom-odor'  
 al mistera kaj sopira glori'!

La knabinoj ridetas  
 kaj florojn petas.  
 Ja amora printempo  
 por brila kaj jubila tempo!

## Jadranka Miric (Serbio)

### Malfrua vintro

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo<sup>5</sup>

Matene  
sur ĉielo jam  
ariĝis blankaj nuboj.  
Suno penetris pene  
inter nubar'. Ve,

nubaro  
densiĝis plie,  
ŝajnis kiel sunlumo  
perdiĝis funde ie,  
sub nubar'. Tie

griziĝis  
ĉielo pale.  
Kiam vintro printempas  
aer' varmiĝas. Male  
je brilo, hele

ĵetita  
de kosma stelar'  
kiu eterne frostiĝis.  
En la naturo birdar'  
jam flugas en ar'.

Floretoj  
abundas en park'  
kie promenadas vi  
en varmega amobrak'  
ja de cia Mark'.

#### notoj:

1. *Vento inter pinoj* (ĉine: fengrusong): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun 7 kaj 6 versoj respektive de 7,5,734,66 / 7,5,77,66 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xxa,xa / a,a,xa,xa (x=senrima)

2. *Kanto de akva horloĝo en nokto* (ĉine: genglouzi): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po ses versoj de 33,6;33,5; / 33,6;33,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xaa,xb / xcc,xdd (x=senrima)

3. *Aroma laŭbranĉo* (ĉine: guizhixiang): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de 4, 54, 64,734,444 / 7,54,64,734,444 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xa,xxa,xxa / a,xa,xa,xxa,xxa (x=senrima)

4. *Belulino Yu* (ĉine: Yumeiren) ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 7,5; 7,9; / 7,5;7,9; silaboj kun para rimo.

5. *Sopir-al-sudo* (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksfirma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).

## Laimundas Abromas (Litovio)



### Ĉi ne plu kaptos vin

Estis la kvara horo posttagmeze. Trans la fenestro pluvis. Aĉis aŭtuna pluvo, senĉese kaj ekde la mateniĝo, blovis malvarma vento. Mi sola sidis en mia loĝejo antaŭ televidilo. En la ĉambro tamen estis agrable varme. Miaj artikoj postulis kuracilon, tamen prefere en somero. Mi fermis la okulojn kaj ekvidis la varmegan afrikan sunon, flavoruĝan sablomaron, palmojn balancantajn en la sablaro, kamelan karavanon, marŝanta paŝon post paŝo trans la dezerton... La vera fabelo.

-Mi tre volas al Afriko! - mi laŭte ekkriis kaj saltis de sur la seĝo! – Por vojaĝi en Marokon mi fordonos ĉion ajn!

Enspiris mi profunde la aeron kaj longe tuisis. Neatendite eksonis la telefonaparato. Komence mi ne volis respondi, ĉar malofte iu telefonadis al mi. Tamen mi aliris ĝin kaj prenis aŭskultilon. Mi eĉ malfruis eldiri “halo”, iu voĉo superis min.

-Dominiko, ĉu estas vi? – suspektinde demandis telefoninto.

“Li mian nomon scias!” – mi timtremis. Miaj okuloj malheliĝis. Mi metis aŭskultilon kaj komencis nervoziĝi. “Kiu telefonis al mi? Kion bezonis tiu telefoninto?” - nestis en mia kapo. Mi staris konsterniĝinte, kvazaŭ ŝtoniĝinta.

Post dudek minutoj eksonis sonorilo ĉe la pordo de mia loĝejo. Mi silentis. Mi ĵetrigardis sur la spegulon, kiu pendis apude sur la muro, kaj ekvidis

